

UNIVERSITY OF CALIFORNI

INTERNACIA GAZETO

# LA SIMBOLO



## ESPERANTO



Jaro IIIa


MARTO, 1911

Num. 1a

SYMBOL PUBLISHING CO.

P.O. Box 1020, Tacoma, Washington, U.S.A.

ELIRAS MONATE



PM 8201  
55  
v. 3

# LA SIMBOLO

---

Abonprezo: enlande, Sm. 2,00; eksterlande, Sm. 2,50  
Konto ĉe la Ĉekbanko Esperantista, London

---

Entered as second-class matter April 7, 1909, at the postoffice at Tacoma, Washington  
under the Act of Congress of March 3, 1879.

---

## ENHAVO

Kelkaj "Poemoj en Prozo"  
De Mark Twain  
La Lasta Usonano  
Pri Nia Projekto  
Li Ornamis la Ĉefurbon  
Kiel Bela Estas la Vivo  
U. S. Esperanto Asocio  
En Rusujo Per Esperanto

---


Sin turnu al

## Symbol Publishing Co.,

Post Office Box 1020, Tacoma, Wash.

TO VENU  
ABONOJAS

La Simbolo



Jaro IIIa

MARTO, 1911

Num. 1a


Ĉu ni ne similas al tia sama materialo el kiu la  
songoj naskiĝas ?

KELKAJ "POEMOJ EN PROZO."

EL RUSA LINGVO -- DE IVAN TURGENEV (1).

INTERPAROLADO.

"Nek sur Jungfraŭ, nek sur Fin-  
steraarhorn iam estis homa piedo!"



LPAJ suproj. . . . Tuta ĉeno da krutaj  
terasoj. . . . La korinterno mem de la  
montaro.

Super la montoj -- pale-verda, hela,  
muta ĉielo. Forta, seka frostoj; mal-  
mola, fajreriga neĝo; el-sub la neĝo el-  
ŝoviĝas krudaj pecegoj de glaciigintaj, ventegumitaj  
ŝtonegoj.

(1) Tradukis por LA SIM. D-ro Andreo Fiŝer-Tiffis.

M156830

Du kolosoj, du eguloj supreniĝas ĉe ambaŭ flankoj de l' horizonto: Jungfraŭ kaj Finsteraahorn (2).

Kaj Jungfraŭ diras al sia najbaro: "Kion da nova vi diros? al vi estas pli videble. Kio estas tie, malsupre?"

Forpasas kelkaj miloj da jaroj: unu minuto. Kaj Finsteraahorn tondras responde: "Seninterspacaj nuboj surkovras la teron. . . Atendu!"

Forpasas ankoraŭ miljaroj: unu minuto.

"Kaj nun?" demandas Jungfraŭ.

"Nun mi vidas; tie, malsupre, ĉio estas sama: diverskolora, malgrandeta. La akvoĵ bluiĝas; nigriĝadas la arbaroj; griziĝas amasoj da kunigitaj ŝtonoj. Apud ili ankoraŭ rampadas skarabetaĉoj, vi scias, tiuj dupieduletoj, kiuj ĝis nun ankoraŭ nek vin, nek min sukcesis malpurigi."

"Homoj?"

"Jes; homoj."

Forpasas miljaroj: unu minuto.

"Kaj nun?" demandas Jungfraŭ.

"Ŝajne, malpli multenombraj skarabetoj vidiĝas," tondras Finsteraahorn; "fariĝis pli hele malsupre; la akvoĵ mallarĝiĝis, maldensiĝis la arbaroj."

Forpasas ankoraŭ miloj da jaroj: unu minuto.

"Kion vi vidas?" diras Jungfraŭ.

"Apud ni, proksime, kvazaŭ fariĝis pli pure," respondas Finsteraahorn; "nu, kaj tie, malproksime, en la valoj, vidiĝas ankoraŭ makuloj, kaj io movetiĝas."

"Kaj nun?" demandas Jungfraŭ, post pluj miljaroj: unu minuto.

(2) Montegoj en svisa alparo.—A. F.

“Nun estas bone,” respondas Finsteraahorn; “ĉie fariĝis pure, tute blanke, kien ajn oni rigardas. . . Ĉie kuŝas nia neĝo, la glata neĝo, kaj la glacio. Ĉio estas glaciiginta. Nun estas bone, kviete.”

“Bonege,” ekparolis Jungfrau. “Tamen ni estas sufiĉe babilintaj, maljunulo. Estas jam tempo por dormi.”

“Estas jam tempo!”

Dormas la grandegaj montoj; dormas la verda luma ĉielo super la tero por ĉiam silentiĝinta.

----

#### ALMOZULO.

MI laŭiris straton . . . almozulo, kaduka maljunulo min haltigis.

Brulumitaj, plorumaj okuloj, bluiĝintaj lipoj, mizeraj ĉifonaĵoj, malpuraj ulceroj. . . Ho, kiom malbele la malriĉeco estis ĉirkaŭmordetinta tiun kompatindan estaĵon!

Li etendis al mi sian ruĝan, ŝvelintan, malpuran manon. . . Li ĝemis, li blekis pri helpo.

Mi ekis palpi en ĉiujn miajn poŝojn. . . Nek monujon, nek horloĝon, nek eĉ poŝtukon . . . mi nenion estis preninta kun mi.

Tamen la almozulo adis atendi . . . lia etendita mano malforte ŝanceliĝis kaj tremetis.

Perdiĝinta, konfuzigita, mi forte ekpemis tiun malpuran, tremantan manon. . . “Ne mallaŭdu min, frato; mi havas nenion, frato.”

La almozulo regardis min per siaj brulumitaj okuloj; liaj bluaj lipoj ekridetis, — kaj li siavice ekpemis miajn malvarmiĝintajn fingrojn.

“Kion do fari, frato?” li elparolis sendente: “eĉ pro tio — dankon. Ĝi ankaŭ estas almozo, frato.”

Mi komprenis, ke mi ankaŭ estas ricevinta almozon de mia frato.

— — —

#### ORIENTA LEGENDO.

KIU en Bagdado ne konas la grandan Ĝiafar'on, la sunon de l' universo?

Unufoje -- antaŭ multe da jaroj -- li estis ankoraŭ junulo, -- Ĝiafaro promenis en la ĉirkaŭaĵo de Bagdado.

Subite al lia aŭdo alflugis raŭka krio: iu malespere vokis pro helpo.

Ĝiafaro distingiĝis inter siaj samaĝuloj per prudenteco kaj pripensemo; sed lia koro estis kompatema, -- kaj li fidis al sia forto.

Li kuris laŭ la krio kaj ekvidis kadukan maljunulon, alprematan al urba muro de du rabistoj, kiuj lin rabis.

Ĝiafaro eligis sian glavon kaj atakis la krimulojn: li mortigis la unuan kaj forpelis la duan.

La liberigita maljunulo falis ĉe la piedojn de sia savinto kaj, kisante la randon de lia vesto, ekkriis: “Kuraĝa junulo, via grandanimeco ne restos senrekompenco. Laŭŝajne mi estas malriĉa almozulo, sed nur -- laŭŝajne. Mi ne estas simpla homo. Venu morgaŭ, frumatene, al la ĉefa bazaro; mi atendos vin apud la fontano, — kaj vi konvinkiĝos pri la praveco de miaj paroloj.”

Ĝiafaro ekpensis: “Laŭvide ĉi tiu homo estas almozulo, certe; tamen--ĉio estas ebla. Kial ne ekprovu?” -- kaj li respondis: “Bone, patro mia, mi venos.”

La maljunulo ekrigardis en liajn okulojn — kaj foriris.

La morgaŭan matenon, kiam apenaŭ ektagiĝis, Ĝiafaro iris al la bazaro. La maljunulo jam lin atendis, sin apogante al la marmora kalikego de la fontano.

Senparole li prenis la manon de Ĝiafaro kaj alkondukis lin en malgrandan ĝardenon, ĉirkaŭitan je ĉiuj flankoj per altaj muroj.

En la mezo mem de la ĝardeno, sur verda herbejo, kreskis arbo de neordinara aspekto.

Ĝi similis cipreson; nur ĝia foliaro estis lazurkolora.

Tri fruktoj -- tri pomoj -- pendis sur maldikaj suprenfleksitaj branĉetoj: la unua -- de meza grandeco, longforma, lakteblanka; la dua -- granda, globforma, hel ruĝa; la tria -- malgranda, sulkigita, dubeflava.

La tuta arbo malforte bruotis, kvankam estis nenia vento. Ĝi sonoradis delikate kaj plende, kvazaŭ vitra; ŝajnis, ke ĝi sentas la alproksimiĝon de Ĝiafaro.

“Junulo!” ekparolis la maljunulo. “Deŝiru iun ajn el ĉi tiuj fruktoj kaj sciu: se vi deŝiros kaj manĝos la blankan, -- vi estos la plej saĝa el ĉiuj homoj; se vi deŝiros kaj manĝos la ruĝan, — vi fariĝos riĉa, kiel la hebreo Rothschild; se vi deŝiros kaj manĝos la flavan, -- vi plaĉados al maljunaj virinoj. Decidiĝu! . . kaj ne tro malrapidu. Post unu horo la fruktoj velkiĝos, kaj la arbo mem foriĝos en la mutan profundaĵon de la tero!”

Ĝiafaro mallevis la kapon -- kaj ekpensiĝis. “Kion do fari tiuokaze?” li elparolis duonvoĉe, kvazaŭ rezonante kun ŝi mem. “Se mi fariĝos tro saĝa, -- eble mi ne volos vivi; se mi fariĝos pli riĉa ol ĉiuj homoj, -- ĉiuj min enviados; pli bone do mi deŝiru kaj manĝu la trian, sulkigitan pomon!”

Kaj li tion faris. La maljunulo ekridis per sendenta rido kaj diris: “Ho, plej prudenta junulo! Vi elektis la plej bonan parton! Por kio vi bezonus la blankan pomon? Vi ja sen ĝi estas pli saĝa ol Salomono. La ruĝa pomo ankaŭ ne estas necesa al vi . . . sen ĝi vi estos riĉa; almenaŭ neniuj enviados vian riĉecon.”

“Diru al mi, maljunulo,” ekparolis Ĝiafaro, ekstremitante: “Kie loĝas la respektinda patrino de nia Diservata Kalifo?”

La maljunulo salutis, sin klinante ĝis la tero, -- kaj montris la vojon al la junulo.

Kiu en Bagdado ne konas la sunon de l’ universo, la grandan, gloran Ĝiafar’on?



LA bonokazo estas bridita kaj selita ĉevalo, kiu unufoje haltas antaŭ ĉies pordo. Estu preta, eksaltu en la selon, kaj li portos vin al honoro kaj famo. Prokrastu eĉ momenton, kaj, laŭ la koridoroj de l’ Tempo, la brua eĥo de liaj flugantaj hufoj por ĉiam rememorigos vin pri tio, kion vi perdis. — Charles Stewart Parnell.



MALFORTULO atendas la okazon; ordinara homo trovas ĝin, kiam ĝi venas; grandulo kreas tiun, kiun li deziras. — Toneros, en Sveda Esperantisto, Hedemora.




DIRIS la Muziko: Mi min trovis, kiam mi eksciis, ke la Koro de l’ Humaneco ĉie pulsas kun sama ritmo. — Peace Pipe Press, Seatlo, Wash.



## DE MARK TWAIN.

“VIZITO ĈIELON DE KAP. STORMFIELD” (1).



OST ankoraŭ kelka interparolo pri tiu temo, mi diris: “Sandy, mi rimarkas, ke mi preskaŭ neniam vidas blankan anĝelon; kie mi trovas unu blankulon, mi renkontas almenaŭ cent milionojn da kuprokoloruloj -- personoj kiuj ne povas paroli angle. Kial estas?”

“Nu, vi trovos ke estas tute same en ĉiu ŝtato kaj teritorio en la usona angulo de ĉielo, kien ajn vi iros. Mi unufoje ekpafiĝis kaj fulmorapide vojaĝis milionojn post milionoj da mejloj, tra sennombraj amasegoj da anĝeloj, sen vidi eĉ solan blankulon, sen aŭdi eĉ vorton kiun mi povis kompreni. Vi scias, ke indianoj kaj aztekoj kaj tiaspecaj popoloj loĝadis en Ameriko bilionon da jaroj antaŭ ol blankulo kia ajn staris sur ĝia tero. En la daŭro de tricent jaroj post la eltrovo de Kolumbo, neniam loĝis je unu tempo pli multe ol unu mezgranda parolada aŭdantaro da blankuloj en Ameriko -- mi volas diri, en la tuta lando, britaj havaĵoj kaj ĉio. Je la komenco de nia jarcento troviĝis nur ses aŭ sep milionoj -- eble sep; 12,000,000 aŭ 14,000,000 en jaro 1825; eble 23,000,000 en 1850; 40,000,000 en 1875. Inter ni la proporcio de mortoj estas ĉiam po 20 en 1000 ĉiujare. Nu,

(1) Eltiro el angla verko, de “Mark Twain,” fama usona humoristo; por LA SIMBOLO tradukis Farnsworth Wright - Reno, ŝtato Nevado. (From “Captain Stormfield’s Visit to Heaven,” published by Harper & Brothers; copyright, 1909, by Mark Twain Company; — kun permeso.)

140,000 personoj mortis en la unua jaro de la jarcento; 280,000 mortis en la dudekkvina jaro; 500,000 en la kvindeka jaro; ĉirkaŭ miliono en la sepdekkvina jaro. Mi estu liberala pri la nombro, kaj mi konstatu, ke kvindek milionoj da blankuloj mortis en Usono de la komenco ĝis nun -- diru 'sesdek,' se vi volas; diru 'cent milionoj' -- kelkaj milionoj pli aŭ malpli ne gravas. Nu, do, vi mem povas percepti, ke, se oni disvastigus tian malgrandan kvazaŭ polveron el personoj sur jenaj centoj da bilionoj da mejloj da usona tero en ĉielo, estus kvazaŭ oni dissemus dekcendan (2) skatoleton da piloloj sur la Granda Saharo, esperante trovi ilin. Ni ne rajtis esperi ke ni eĉ iomete valoros en ĉielo; kaj ni ne valoras -- nu jen estas la nuda fakto, kaj ni devas elteni ĝin kiel eble plej bone. La instruituloj el aliaj planedoj kaj aliaj sistemoj venas tien ĉi kaj vagadas kelkan tempon, rondvojaĝante tra la Regno; kaj fine ili iras returne en sian regionon de ĉielo; kaj ili verkas vojaĝlibrojn, en kiuj ili donas eble kvin liniojn pri Ameriko. Kaj kion ili diras pri ni? Ili diras, ke tiu ĉi dezerto enhavas disĵetitan loĝantaron el kelkcent milbilionoj da ruĝaj anĝeloj, kune kun, tie ĉi kaj tie, strange vizaĝkolora malsanigita anĝelo. Ĉu vi komprenas? Ili opinias ke ni blankuloj kaj la okaze trovita nigrulo estas indianoj blankigitaj aŭ nigritaj de ia lepra malsano -- pro iu strange malnobla peko -- nur pripensu! Ĉio ĉi tio estas treege acida pilolo al ni ĉiuj, amiko mia, eĉ al la plej modestaj (kaj ni ne pripensu aliajn specojn, kiuj prezentas al si, ke oni bovenos ilin kiel antaŭlonge perditan registaran obligacion, kaj ke krom tio ĉirkaŭbrakos Abrahamon). Mi ne pridemandis al vi la cirkonstancojn, Kapitano, sed mi su-

(2) Dek cendoj ĉirkaŭvaloras du spescentoj.

pozas ke ne necesas diri -- se iom valoras mia memoro pri mia akcepto en ĉielon -- ke oni ne multe hurais pri vi kiam vi alvenis; -- ĉu mi diras prave?"

"Ne altuŝu ĝin, Sandy," mi diris, iom ruĝiĝinte. "Mi ne konsentus, eĉ kontraŭ la plej granda monsumo kiun vi povas nomi, ke la familio ĝin vidu. Ŝanĝu la temon, Sandy; ŝanĝu la temon."

"Nu, ĉu vi pripensas transloĝiĝi la Kalifornian departementon de feliĉo?"

"Mi ne scias. Mi ne pripensis ion definitivan rilate tion, ĝis kiam la familio alvenos. Mi pensis ke dume mi iom esploru, trankvilmaniere, kaj decidu poste. Cetero, mi konas iom multe da mortintoj, kaj mi intencis elserĉi ilin kaj interŝanĝi kun ili babilaĵojn pri amikoj, kaj pri la malnova tempo, kaj tio ĉi kaj tio, kaj demandi al ili, kiel ili ŝatas la lokon ĝis nun. Mi tamen opinias ke mia edzino deziros enloĝiĝi la Kalifornian regionon, ĉar la plimulto da ŝiaj perditaj parencoj estos tie, kaj ŝi ŝatas esti kun personoj kiujn ŝi konas."

"Ne permesu al ŝi. Vi vidas, kia la Jerza distrikto de ĉielo estas por blankuloj; nu, la Kalifornia distrikto estas miloble tiel malbona. Ĝi svarmas je malnobla speco de ledokapaj kotokoloraj anĝeloj -- kaj la plej proksima najbaro estas plejofte malproksima je miliono da mejloj. Tio, kio mankas en ĉielo, estas kunuloj -- kunuloj de la ĝusta speco kaj lingvo. Du-trifoje mi preskaŭ transloĝiĝis la Eŭropan parton de ĉielo, pro tio."

"Nu, kial vi ne faris, Sandy?"

"Ho, pro diversaj kialoj. Ekzemple, kvankam tie oni vidas sufiĉe grandnombre la blankulojn, oni preskaŭ ne povas kompreni unu el ili; kaj tial oni sopiras la interparoladon ĝuste tiom multe, kiel tie ĉi. Mi ŝatas

rigardi ruson aŭ germanon aŭ italon -- mi eĉ ŝatas rigardi francon se eble mi bonŝancas trovi lin farantan ion ne malĉastan -- sed nura rigardado ne kuracas la malsaton -- kion oni deziras, tio estas la interparolado.”

“Nu, do, ĉu ne troviĝas Anglujo, Sandy -- la angla distrikto de ĉielo?”

“Jes, sed ĝi estas ne multe pli bona ol tiu ĉi ekstremo de la ĉiela bieno. Kiam oni renkontas anglojn naskitajn en la lastaj tricent jaroj, bone estas; sed en tiu momento kiam oni alvenas antaŭ la tempo de reĝino Elizabeto, la lingvo nebuliĝas; kaj ju pli oni iras malantaŭen en la tempon, des pli nebula fariĝas la lingvo. Mi iom interparolis kun unu persono nomita Langland, kaj kun viro de la nomo Chaucer -- malnovtempaj poetoj; -- sed neniel helpis, mi ne povis ilin kompreni, kaj ili ne povis kompreni min. Post tiam mi ricevis de ili leterojn, sed verkitajn en tiel erarplena angla, ke mi ne povis eltrovi kion ili volis diri. Antaŭ la tempo de tiuj homoj, la angloj estas nur fremduloj, nek pli nek malpli; ili parolas danan, germanan, normandifrancon, kaj iafoje miksaĵon el la tri; antaŭ tiuj, ili parolas latinan, kaj antikvan britan, irlandan kaj gaelan; -- kaj antaŭ tiuj ĉi lastaj sin trovas bilionoj post bilionoj da nuraj sovaĝuloj, kiuj parolas lingvaĉon kiun Satano mem ne povus kompreni. Jen estas la fakto: kiam en la anglaj lokoj vi renkontas unu homon kiun vi povas kompreni, vi devas vadi tra teruraj svarmegoj kiuj parolas ion tian, ke oni ne povas decidi, kiu parto de la lingvo estas kapo kaj kiu estas vosto. Vi scias, ke en la daŭro de biliono da jaroj, ĉiu lando en la mondo tiel ofte hompleniĝis de diversaj rasoj de homoj kaj diversaj specoj de lingvoj, ke tia miksgenta kaj mikslingva rezultato nepre devis okazi en ĉielo.”

## LA LASTA USONANO.

FRAGMENTO EL LA TAGLIBRO DE KAN-LI.

(Daŭrigo)



A 20an de Majo: Glacia vento kun pluvego el la nordoriento. Hieraŭ ni spasme spiris pro la varmega aero. Hodiaŭ ni tremas en vintraj vestoj.

La 21an de Majo: Same kiel hieraŭ. La plimulto de ni estas malvarma. Miaj dentoj tremas kaj mi estas kaj varma kaj malvarma. Ventego pli malbona neniam ĝemis ĉirkaŭ ŝipo. Omar nomis ĝin la kriegantaj voĉoj de la cent milionoj da Usonanoj kiuj sendube pereis en simila vetero.

La 16an de Junio: Estas multaj tagoj de kiam mi tuŝis ĉi tiun taglibron. Abomenan malsanon mi havis, kiu detruis energion kaj kuraĝon. Ĝi kvazaŭ similis al febro, kaj tamen miaj membroj estis malvarmaj. Mi ne povus ĝin priskribi eĉ se mi volus.

Abdul eniris la kajuton hodiaŭ vespere kun kelke da metalaj platoj kaj parolis pri ili. Li tute ne respektas la intelektojn de la antikvaj Usonanoj. Mi pensis momenton ke li kontraŭdiris sin, sed li estis prava kiel kutime. Estis jene:

Abdul: Ili multe legis.

Kan-Li: Vi jam diris al ni ke ili ne havis literaturon. Ĉu ili multe legis nenion?

Abdul: Vere, vi estas ĝin dirinta! Ĉiutage ili publikigis vastajn paperfoliojn en kiuj ili plej detale pri-

kribis ĉiujn krimojn. Ju pli terura la krimo, des pli preciza la priskribo. Teruroj estis ilia ĉefa ĝojo. Skandalojn ili englutis kun malsataj okuloj. Ĉi tiujn kronikojn de krimo kaj abomenaĵoj ili eldonis cent-milope. Preskaŭ ĉiu familio en la lando legis ilin.

Kan-Li: Kaj ĉu tio anstataŭis la literaturon?

Abdul: Jes.

La 20an de Junio: Ree ni estas sur la maro; malproksime de Nov-Jorko je dutaga vojaĝo. Nia decido estis subita. Abdul, en malfeliĉa momento, trovis inter tiuj malbenitaj platoj geografian karton de la lando, kaj sekve de tio li sentis fortegan deziron viziti unu urbon nomitan "Washington." Mi ŝanceliĝis kaj fine konsentis, malsaĝe mi pensas, ĉar la ŝipanaro sopiras Persujon. Kaj tiu ĉi urbo kuŝas enlande apud rivero. Li diras ke ĝi estis ilia plej belega urbo, la registara sidejo, la ĉefurbo de la lando. Ab-i-Garm ĵuras ke li ĝin povos trovi se la karto estas vera.

Hason ankoraŭ manĝas sola.

Hodiaŭ posttagmeze ni ripozis sur la ferdeko, dum Testudo kviete naĝis suden. Tero vidiĝis laŭ la dekstra flanko de la antaŭflanko, nedifinita strio laŭ la okcidenta horizonto.

Iom post tagmezo, dum ni preternaĝis la ruinon de giganta turo -- eble lumturo -- Abdul subite ekstaris kaj ĉirkaŭrigardis. Tiam li alparolis Ab-i-Garmon, demandante je kiom da mejloj ni estas malproksime de la Nov-Jorka haveno. La respondo mi forgesis, sed ĝi treege ekscitis la maljunulon. Mi rimarkis nekutiman brilon en liaj okuloj, ankaŭ ekstremon de la fingroj dum li almontris la maron ĉirkaŭan, kaj ekparolis:

“Sub ni, la fundo de l’ maro estas kovrita de feraj ŝipoj -- ruinoj de grandiozaj militŝiparoj--la plej potencaj en la homa historio!”

Tuj ni ĉiuj interesiĝis.

“Kiu militŝiparoj?” mi demandis. “Kaj kio detruis ilin? Ĉu estis batalo?”

Abdul: Batalo, grandega ekster la koncepto de iu Perso; konflikto en kiu la maro skuiĝis kaj la ĉielo disŝiriĝis per la tondrado de feraj monstroj. Unu el ili estis sufiĉe potenca por dispecigi en atomojn tutan aron da Testudoj.

Jafar-el-Beg: Vere! Tio estas rakonto facile dirita, sed ĝi tute ne estas kredinda. En Testudo mi sentus min sufiĉe forta por kontraŭstari iujn el viaj infan-fabelaj mirindaĵoj.

Abdul: Saĝa vi estas. Ĉar la perdo de via cerbo, Jafar-el-Beg, ne povus influi vian parolon.

Je kio ĉiuj ridegis, kaj Jafar-el-Beg silentis.

Kan-Li: Rakontu al ni pri tiu ĉi batalo, ho Abdul. Mi rememoras nun ke mi iam legis pri ĝi en la kolegio. Tiujn ĉi detalojn pri la antikva historio mi forgesas. Kiamaniere ĝi okazis?

Abdul: Mi jam diris ke la Usonanoj estis avaraj. Kaj ilia avareco, fine, okazigis tiun ĉi militon. Per partiaj leĝoj ili havigis al si la leonan parton de la komerco de la mondo. Tio haltigis la prosperon de aliaj nacioj, ĝis fine la plej potencaj nacioj de Eŭropo kombiniĝis por memdefendo kontraŭ tiu ĉi ĉion-sorbanta avido. Ili amasigis mararmeon plej grandegan. Tiam, trans la oceanon, venis la fera malamiko. Kaj tie ĉi, sur la loko kie ni nun naĝas, ili renkontis la usonajn ŝipojn.

Kan-Li: Kiom da ŝipoj entute?

Abdul: La Usonanoj havis okdek grandajn ŝipojn el fero, kaj multajn pli malgrandajn ŝipojn. La malamikaro havis ducent kvardek grandajn ŝipojn, ĉiuj el fero. Ankaŭ pli malgrandajn ŝipojn por diversaj celoj ili havis.

Kan-Li: Alaĥo! Malbona afero por niaj avaraj amikoj! Kaj estante nacio da komercistoj ili eble malŝatis militon.

Abdul: Pri tio la historiistoj malkonsentas. Laŭ la Usonanoj mem ili estis potencaj militistoj. Sed iuj tiamaj verkistoj donas alian ideon. Ala-el-Kalaf estas certa ke ili estis timuloj, malfortaj en korpo kaj spirito, sed ofte tre bonŝancaj. Laŭ mia opinio ĉi tiu batalo ĵetas plenan lumon sur la aferon. Tago simila al tiu ĉi ĝi estis, ankaŭ en Junio, kiam la Eŭropanoj, naĝante norden laŭ la marbordo por kapti Nov-Jorkon, renkontis la usonan admiralon Bedford kun liaj okdek ŝipoj. Kaj la batalo ne longe daŭris.

Kan-Li: Vere, mi kredas vin! Tial ke la Eŭropanoj havis po tri ŝipoj kontraŭ unu mi donus al ili ĉirkaŭ duonan tagon, posttagmezon similan al ĉi tiu, por sendi la avarulojn al la fundo.

Abdul: Via konjekto estas bona, ho princo, rilate al la daŭro de la milito. Ĝi daŭris ĝuste someran posttagmezon. Sed estis la Usonanoj kiuj sendis la malamikojn al la fundo. Kaj la maro sub niaj piedoj estas kovrita de feraj korpoj.

Kan-Li: Diablo! Se tio estas vera rakonto, kaj mi ne dubas, la avaruloj ne estis tute malindaj.

Omar: Kiam tio ĉi okazis?

Abdul: En la frua parto de la dudeka jarcento. Mi ne rememoras la daton, sed ĝin neniam forgesis la



Usonanoj. Certe ili juste fieris, ĉar en tiu tago ili faris mirindaĵojn. Admiralo Bedford foje estis ĉirkaŭata de dekduon da germanaj militŝipoj. Kaj jen! li detruis ĉiujn! Kaj el franca kaj rusa ŝiparoj li detruis egalan nombron; ankaŭ kelkajn britajn kaj italajn ŝipojn.

Omar: Diablo! Bonega afero!

Abdul: Jes. Aliajn miraklojn faris la Usonanoj en tiu tago. Teksas, ŝipeto kun pinta antaŭparto, enpremegis truojn en dudekon da grandaj ŝipoj, kaj la akvo englutis ilin. Ankaŭ alia ŝipeto, longa kaj mallargha, kaj de la Usonanoj elpensita, faris grandajn difektojn. Tiu ĉi mirinda maŝino naĝis tien ĉi kaj tien inter la fremdaj ŝipoj kaj ilin difektegis. Multe da gloro la komandanto havigis al si.

Ab-i-Garm: Kaj kiom da ŝipoj perdis la Usonanoj?

Abdul: Raportoj estas kontraŭdiraj. Laŭ Usonano ili ne perdis iun ŝipon, sed laŭ aliaj aŭtoritatoj ili perdis kelkajn.

Kan-Li: Bonega batalo! Sed ĉu vi povas klarigi kiel tia malsupera popolo povis subite fariĝi heroaj?

Abdul: Laŭ Barnes, frua brita historiisto, ili estis mirige bonŝancaj sur la akvo. Kaj tiun diron subtenas unu hispana admiralo, Molino, kiu opinias ke la Usonanoj, estante malpia popolo, estis helpataj de la diablo.



LAŬ raporto de Kolonelo Cooper, nun sin trovas en Portlando, ŝtato Oregono, kvar klasoj de Esperanto. La Portlandanoj tre deziras havi tie la proksiman kunvenon de la E. A. N. A. En lasttempa kunsido en Takomo, delegitoj el la Nordokcidento unuanime kaj tre kore subtenis ĉi tiun proponon.

## PRI NIA PROJEKTO.

PLANO PROPONATA POR LA ORGANIZADO.



**N**OMO: Eklezio de la Morgaño.

**CELO:** Fondi Eklezion kaj Komunumojn, kie ĉies devo estos helpi starigi vivmanieron kaj akiri la rimedojn per kio la individuo povos kreski nature, disvolviĝi libere, kaj sentime iri laŭ la elektita vojo.

**MEMBROJ:** Estos tri klasoj de Membroj: 1, Novic-oj: Personoj kiuj dum nur kelka tempo vivas en la komunumo por provi la planon; 2, Iniciatitoj: Personoj kiuj, post plena studo, konsentas fidele helpi efektiviĝi la komunajn idealojn; 3, Adeptoj: Personoj kiuj, post provo, montras ke ili bone komprenas kaj povas plenumi la postulojn de la fundamenta celo. Nur Adeptoj havos la rajton voĉdoni la estraron.

**ESTRARO:** Konsistos precipe el unu ĉefo (nomota "La Kondukanto"), tri Konsilantoj kaj kvin Episkopoj. Kompreneble la Kondukanto estos ĉefdirektoro; la Konsilantoj siaj ĉefhelpantoj. La unua Konsilanto estos Direktoro de Financaj Aferoj; la dua estos Direktoro de Fakoj; la tria estos Sekretario-Kasisto. La Episkopoj estos Fakestroj kaj Instruistoj. La ĉefa devo de la Konsilantaro estos elfari planojn por konservi la sanon de membroj, flegi la malsanajn, helpi la senlaborajn, zorgi pri infanoj, konduki lernejojn, provizi bibliotekon, aranĝi amuzajojn, ktp.

**KREDO:** Ni kredas ke estas nur unu sola granda Tuto-Potenco, memviva kaj eterna, kiun kelkaj nomas

“God;” aliaj, “La Naturo.” En diversaj landoj kaj en diversaj tempoj troviĝis kaj nun troviĝas diversaj nomoj; sed per kia ajn vortalprenita, ĉie ĉiuj aludas al sama ideo, -- al tiu Spiritu-Energio kaj al tiu Objekto-Materialo, el la kunfandiĝo de kiuj videbliĝas ambaŭ la stelplena ĉielo kaj la solida tero, kune kun ĉiuj formoj, ĉu vivintaj, ĉu vivantaj, ĉu vivontaj en la plej malproksima estonto.

Ni fidas je la bono de ĉi tiu eterne aganta Tuto-Potenco, ĉar estas neeble imagi malbonon al Ĉiapovulo. Se de la antaŭtempaĵo ni ja estas alkondukitaj al ĉi tiu punkto de la evoluado, do nepre estas devige pensi ke tiu sama eterna Potenco, dum ĉiuj venontaj jaroj, restos apud kaj ĉirkaŭ kaj en ni por atendi la plenumon de ĉiu alia ebla homa disvolviĝo.

Ni kredas ke ĉiuj tiuj ĉi disvolviĝoj devenas de inspiro; ke la inspiro leviĝas en la spirito sole pro la postuloj de la evoluado; kaj ke efektive ĉi tiu evoluado estas nur la konstanta irado antaŭen de la Tuto-Potenco mem.

Ni kredas ke, kiam ĉi tiu inspiro estos sufiĉe forta por plejposedi la spiriton, la homo tiel obsedata obstine laboregos ĝis kiam li povas vidi iomgrade la realigon de sia revo, per tiu sukceso disvolvigante definitivan parton de ĉi tiu de eterne deviga disvolviĝado.

Ni kredas ke, de tempo al tempo, en diversaj landoj, pro lokaj kaŭzoj, naskiĝas homoj al ĉi tiuj impulsoj de la Kosma Urĝo superordinare impresmaj; kaj ke ĉi tiuj homoj nepre kaj devige, unue revas kaj poste laboregas por alkonduki en ĉiun sian popolon diversajn plibonigojn. Kiam ili sukcesas, la sukceso rezultas nur de la fakto ke troviĝas en lia popolo kelkaj aliaj personoj, kiuj ankaŭ

plene sentas ĉi tiujn impulsojn, sed mankas al ili la forto sole per si mem forlasi, spite la admonoj kaj persvadoj kaj moko de kontraŭuloj, malnovajn kredojn kaj antikvan vivmanieron. Certe ne estas doninte al ĉiu tiu ĉi ŝajne mem-elektita kondukanto fari same gravan impreson sur sian sekvantaron; tamen, sendube ĉiu faras sian eblon, kaj ĉies laboro estas necesa por la plua disvolviĝo de ĉi tiu Tuto-Potenco kiu vere vivigas kaj funkciigas la ĉiam ŝanĝantan mondon.

La homa tendenco nature estas grupigi ĉiujn samcelanojn por kolektive peni efektiviĝi komunajn revojn, kaj ni kredas ke tiu tendenco nur sekvas la leĝojn de la Tuto-Potenco, kiuj ĉie regas kaj per kiuj ĉiu atomo en la universo nepre kaj devige serĉas kunigi sin kun sia similulo.

Ni kredas ke, je ĉi tiu momento, ekzistas efektiviĝeblaj revoj, por la realigo de kiuj nur mankas la starigo de iliaj simboloj, ĉar estas sole sub oportunaj kaj taŭgaj simboloj ke tiuj, kiuj havas similajn revojn kaj samajn celojn, povas grupiĝi. Unu el ĉi tiuj simboloj jam funkcias -- nia gazeto, LA SIMBOLO. Kaj nun ni proponas konstrui, sur terpeco kiun posedas unu nia amiko, apud nia propra hejmo, sufiĉe grandan konstruaĵon (la duan videblan simbolon de nia celo), kie ni povos starigi iomgrade kaj laŭeble tiujn novajn formojn de vivmaniero, manĝado, ekzercado, lernado kaj amuziĝado, kiujn ni kredas necesaj por nia propra disvolviĝo kaj por la feliĉo de niaj posteuloj. Post tiu paŝo, ni lasos la movadon disvolviĝi laŭ inspiro kaj kreski laŭ kresko en la rondo de niaj kunlaborantoj.

**ARGUMENTO:** La homo aperas el la nekonta kaj en la nekonatan li malaperas; kaj en la daŭro de tuta sia

vivo li restas enigmo al si kaj al siaj konatuloj. Ĉiuj liaj konoj pri la objektiva mondo estas nenio pli, ol subjektivaj impresoj sur la kunvolvaĵoj de lia cerbo. En li, tamen, je la fundo, brulas neestingebla fajrero, kiu iafoje eklumigas la senfinajn koridorojn de la Eterneco; kaj per tiu lumo li klare vidas ke iel de ĉiam kaj iel por ĉiam io en li eterne vivdaŭris kaj eterne vivdaŭros.

De momento de embriiĝo ĝis elveno el utero, la homo funkcias nur per la patrino mem; sed tuj estas tranĉita la ligilo kiu ligis la infaneton al ŝi, videble komenciĝas la individueco; kaj percepto de ĉi tiu individueco, laŭ la iro de la jaroj, kreskas kaj fortiĝas ĝis alvenas maljuneco kaj eluzo de la fortoj. Kredeble dum la graveda periodo penetras al embria cerbo nur tiuj impulsoj kiuj cerbumigas la patrinon. Tial la infano naskiĝas kun precipe patrinaj tendencoj. Sed, de la naskiĝa momento mem, miloj da impulsoj el la ekstera mondo ĉirkaŭvolvas la etulon kaj en ĝian nervaron komencas inicii senperajn impresojn. Ripetado de ĉi tiuj impresoj fine vekas la konscion. Iom post iom la infano konstatas per kontakto ke ekzistas aliaj objektoj, aliaj estaĵoj, kiuj limigas la sferon kaj malvastigas la amplekson de liaj agoj. Kaj estas ĉi tiuj sentoj de limigo, binditaj per la memorpovo, kiuj eventuale estigas en li propran koncepton de lia individueco.

Ne estas grave ke neniu povas konstati ĝuste kian formon li havis en la antaŭtempaĵo kaj ĝuste kian formon li havos en la posttempaĵo. Sufiĉas ke li vivas; ke iel, ie, iam li vivis—iel, ie, iam li vivos. Tamen, neeble estas ne imagi ke, en la senfina eterna estinta ekzisto, li neniam konis kaj travivis la formojn kaj la spertojn de la nuna ekzisto; plie, kaj pli grave, neeble estas ne

imagi ke, en tiu senfina eterna estinta ekzisto, li neniam konis kaj travivis la formojn kaj la spertojn de la estonto! Por igi bonsanulon rememori okazintaĵon bone konitan al li, nur estas necese okazigi staton plensimilan al tiu kaŭzinta la unuan cerbobildon. Per sama rezonado, se la homo portas el la estinto rememoraĵojn pri senfina antaŭa ekzisto, por revivigi tiujn rememoraĵojn nur estas necese ke plensimila stato okazu! Do tio, kion ni nomas revo, vere estas rememoro pri estinta stato, kaj ie, iel, iam ĝi estos realigata. Tial oni devus plenfidi je efektivegeblaj revoj, ĉar ĉi tiuj estas nur rememoroj pri antaŭaj disvolviĝoj de la eterna Tuto-Potenco, kies integrala kaj funkcia parto ni sendube estas.

— — —  
Ni invitas viajn helpon kaj aliĝon.

FRED RIVERS, je la nomo de

EKLEZIO DE LA MORGAUO.



MI konstante opiniis, ke ne ekzistas pli kristana scienco, ol la lingvo-scienco, la scienco, kiu ebligas interrilaton kaj solidarecon kun la plej granda nombro da homoj. Mi multfoje vidis, ke homoj malamike interrilatis nur sekve de l' meĥanika baro kontraŭ la reciproka komprenado. Tiamaniere, la ellerno de Esperanto kaj ĝia propagando estas sendube kristana agado, akcelanta la estigon de l' Regno Dia, — la agado, kiu prezentas la ĉefan kaj solan mision de homa vivo. — Leo Tolstoj. — Eltiro el "Ondo de Esperanto."

## LI ORNAMIS LA ĈEFURBON.

EL VERKARO "DRASKI & SHARKI" DE IV. VAZOV (1)

**C**HIU, kiu lin konis antaŭ du jaroj, rememoras kiel estis tute alia homo sinjoro Buĉinski: malpeza, agrabla kaj gaja; ĉiam en bonhumoro, kio havis infektan agon sur la aliajn. Li serĉis tiam la societon, kiu ankaŭ lin serĉis; interesigis lin ĉiuj novaĵoj urbaj, kaj ĉiuj komunaj demandoj, kaj la plej bonaj postmanĝaĵoj, kaj la politiko, kaj la sorto de Bismarko kaj eĉ la literaturo...

Nun jam sinjoro Buĉinski estas tute la kontraŭa. Li ne estas tiu, kiu li estis. . . Klininta estas li la kapon al la tero, ĉiam enpensigita, ĉiam encentrigita, ĉiam sub la ŝarĝo de iu mistera pereiga zorgo. Al li restos la mondo! . . La rideto foriĝis el lia vizaĝo, la ĝojo ne trovas teraĵon en lia koro — ĝi estas tie fremdulino — kie enloĝiĝas la vermo de iu eterna enuo. Nek en societo jam, nek en kafejoj, nek en ĝardenoj li estos vidita. Vidviĝis de sinjoro Buĉinski ĉiuj gajaj lokoj. La politiko kaŭzas al li naŭzon, verŝajne--ankaŭ la tuta mondo! Kaj la literaturo? Dio mia! Li resendadas returnen ĉiujn gazetojn kaj ĵurnalojn, kiujn, laŭ malnova kutimo, la redakcioj faras al li la honoron sendi. Ne estas pri ĵurnaloj al Buĉinski.

Kio estas al tiu eksamiko de l' mondo kaj de l' vivo? Kia malamika demono lin forigis de ili? Kial li ŝajnas tiel malfeliĉa?

(1) El bulgara lingvo, por LA SIMBOLO, tradukis Ivan H. Krestanof, Peŝtera, Bulgarujo.

Tiuj, kiuj juĝas facile, diras ke sinjoro Buĉinski estas ofero de ia hipoĥondrio.

Aliaj certigas — sekretaj hejmaj malfeliĉoj...

Aliaj — supozas alian.

Aliaj — ili nenion supozas, ĉar ne interesiĝas pri sinjoro Buĉinski.

Kaj la afero estas tute simpla.

Sinjoro Buĉinski havas . . havas . . nu mi diru kuraĝe . . havas novan domon je tri etaĝoj, aŭ tri-etaĝan, kiele esprimiĝas science la Sofianoj.

La nova domo je tri etaĝoj — jen la solvo de l' problemo.

Kaj ekrigardu, kiele li estas klinita al la tero, ĉu ne klariĝas, ke pezas sur lia dorso la ŝarĝo de tri etaĝoj?

Kaj rigardas li hodiaŭ sian domon kaj diras al si:

“En la tero sub tiu ĉi domo, kaj en la muroj, kaj en la arkaĵoj, kaj en la ĉambroj, kaj en la tegmento ĝia mi enterigis mian sanon kaj riĉaĵon kaj trankvilecon. Kaj de kiam mi fariĝis mastro de tiu ĉi domo, ĉiuj ĝojoj mondaj min forlasis kaj mia vivo pleniĝis anstataŭ ili per kambioj, per ŝuldoj neelpageblaj, templimoj, vizitoj de l' banko, garantiaĵoj, aktoj, notarioj; per korektoj, riparoj, preparoj, alfaroj, disputoj; per batalo kun la subteraj sofiaj akvoj, kiuj faras el miaj keloj lagojn, kien venas al vi tento droniĝi; kaj per malbonaj luantoj; kaj per multego da donoj: regnaj, urbaj, distriktaĵoj, lernejoj, fervojaj, akvaj, balaaĵaj, kaj per flavaj kaj ruĝaj paperetoj portitaj al mi de birnikoj, kaj per invitfolioj kaj juĝoj kun mastroj depost du jaroj — kaj la tuta tiu superakvego da malbelaĵoj ariĝis sur mia vivo, ĉar iun tagon sinjoro Buĉinski ekdeziris ornami la ĉefurbon!



“Kaj tiu ĉi domo, anstataŭ min ĝojigi, estas al mi malamata kaj terura, kiel ĉerko, en kiu estas enterigita mia spirita trankvileco!”

. . . . .

Sed iun tagon la urbanoj, kaj la kafejoj, kaj la stratoj, kaj la ĵurnaloj vidis denove sinjoron Buĉinski; kaj sinjoro Buĉinski estis denove hela kaj feliĉa, kiel antaŭe. Al la demandoj de l' mirigitaj siaj amikoj, li respondadis ruze-rideteme, fortranĉante grandan pecon da koprivŝtica'a (2) kolbaso:

“Mi vivos kiel Stara-Planina (3) ja.”

Sed kiel fariĝis tiu ĉi mirindaĵo? Ĉu sukcesis plej poste venki ĉiujn malhelpojn sinjoro Buĉinski? Ĉu li kutimiĝis ilin? Ĉu li paciĝis filozofie kun sia situacio? Aŭ kio?

Ne, sinjoro Buĉinski faris ankoraŭ pli bonan, ol tio:  
Li vendis la domon!

Kaj grave, sukcese: li ricevis preskaŭ la duonon de l' prezo, kiun kostis la domo.

Kaj nun sinjoro Buĉinski plu havas nek zorgon, nek ŝuldon.

Vere, li ankoraŭ marŝas iomete klinita al la tero.

Lia dorso estis trarompita por ĉiam de la pezo de l' tri etaĝoj!

(2) Koprivŝtica: bulgara urbeto konata laŭ siaj kolbasoj — troviĝas inter la Balkano kaj Sredna Gora-montaro. — Rim. de la trad.

(3) Stara-Planina: laŭvorte, “Maljuna Montaro;” estas bulgara nomo de la Balkano.



SENDU “La Simbolo'n” al viaj geamikoj.

## KIEL BELA ESTAS LA VIVO!

EL PSIKOLOGIO DE L' RUSA JUNULARO (1).

SKIZO.

I.



A unuan fojon mi renkontis ŝin antaŭ tri jaroj, en Napolo.

Malgranda malgrasa pala, kun grandaj malgajaj okuloj, ŝi ŝajnis malforta kaj malsana infano. Kaj ŝi vere estis preskaŭ infano. Ŝi havis nur deksep jarojn, kvankam laŭ eksterajo oni pensus, ke ŝi havas ne pli ek dekkvin.

Oni nomis ŝin Rozo.

Tiu nomo tre malmulte harmoniis kun ŝia nebela vizaĝo kaj kaduka neinfane ĝiba figureto. Ŝi rememorigis ne pri floranta freŝa rozo, sed izola subrompita kampa herbero, kiun longatempe kaj senkompate turmentadis aŭtuna vento.

Ankoraŭ pli strange, preskaŭ moke sonis, kiam oni prezentis ŝin al mi:

“Revolucianino.”

Ŝajne, tre malmulte da komunaĵoj estus inter tiu silenta revema malsana kreitaĵo kun reliefaj signoj pri disvolviĝanta ftizo -- kaj la servera, plena de eternaj maltrankvilegoj, sinsenigoj kaj danĝeroj, -- de ĉiama streĉiĝo kaj batalado, agado revolucia, en kiu pli grandaj ol la ŝiaj fizikaj fortoj konsumiĝadis en daŭro de nur kelkaj monatoj.

(1) Laŭ efektivo verkis Simeon Poltavski el Saratov, Rusujo.

Ŝia historio, kiun oni rakontis al mi kun kutima sendiferenteco, kiel oni rakontas ĉiam la historiojn de fremdaj, ne proksimaj homoj, estis, se vi volas, historio plej ordinara.

Dum la memorindaj tagoj de 1905-1906 la familio de Rozo loĝis en unu el la negrandaj distriktaj urbetoj de Polujo, kies nomon oni ne bezonas ĉi tie diri. En la urbeto, kiel en multaj aliaj urboj de l' Rusa Imperio, ekzistas revolucia organizaĵo, prezentinta el si, se mi ne eraras, ion similan al filio de la fama pra-germana "Bund."

En agado de tiu organizaĵo partoprenis Rozo.

Kiel ŝi trafis tien, oni ne scias. Estis diro, ke ŝi sukcesis tion dank' al rekomendo de unu el siaj parencoj, kiu okupis lokon de farmacisto en la urba apoteko kaj estis samtempe komitatano de l' organizaĵo. Eble vero. Sed la fakto, kiel ajn fariĝinta, restas fakto. Rozo estis "partiano" kaj partoprenis ĉiujn entreprenojn de l' organizaĵo.

Kion ŝi faris tie?

Kredeble, ŝi tre regule vizitadis la ankunvenojn. Silenta, enpena, ŝi modeste alpremiĝadis al muro en ia malproksima angulo, atente rigardadis per siaj grandaj nigraj okuloj la sin anstataŭantajn unu post alia parolantojn kaj kun eksveneto de koro aŭskultadis iliajn flamajn indignajn paroladojn. Eble ŝi ankaŭ devis fari malgrandajn servojn en rolo de perulo inter la anoj de l' organizaĵo.

Sed krom ĉio tio, sur ŝi certe kuŝis unu tre grava kaj respondeca afero.

Ŝi devis kaŝi en sia loĝejo la "kontraŭleĝan" partiliteraturon.

Tiu rolo, pri kiu ŝi verŝajne tre fieris, estis por ŝi ja taŭga. Rozo estis tiel nerimarkebla, silentema, havis tiom malmulte da konatoj, -- kaj krom tio, kiu povus suspekti en ia ajn rilato al la revolucio malriĉan hebrean familion kunmetitan nur el maljunaj gepatroj kaj juna knabino, preskaŭ infano?

Sed la sur sin prenita de Rozo problemo kaŝi revolucian literaturon estis pli danĝera, ol oni pensis. Kaj tiu danĝereco alportis la neeviteblan katastrofon, kiu -- kiel ĉiam--venis ĝuste tiam, kiam oni ĝin tute ne atendis.

Unu belan tagon alvenis traserĉi la polico. La rolo de l' juna hebreino estis malkaŝata kaj ŝin minacis aresto kun la pluaj sekvoj.

Feliĉe, tiumomente Rozo ne estis dome. Tial ke sciigo pri la traserĉo kaj eltrovo de partia literaturo jam post kelkaj horoj fariĝis posedo de la tuta urbo, Rozo kaj ŝiaj kamaradoj eksciis pri la okazintaĵo pli frue ol la polico sukcesis trovi postesignojn de la juna revolucianino.

Oni longe ne prokrastis. Tuj estis fabrikita falsa pasporto, el la partia kaso eliris dudek rubloj da mono, kaj la "politika krimulino" rapidis forkuri alilanden.

Unue, ŝi trafis rusan migrulan kolonion en Berlin. Tie ŝi pasigis ĉirkaŭ du monatojn, ĝis ŝia mono tute elspeziĝis. Ŝiaj gepatroj estis tiel malriĉaj, ke ili ne povis sendi al ŝi eĉ unu moneron. La komitato, organizinta la forkuron alilanden, baldaŭ estis disigita dank' al aresto de kelkaj plej energiaj anoj kaj kelkatempe ĉesis ekzisti. La migrula kolonio ankaŭ ne volis teni ĉe si konfuziĝeman, ne sciantan tuj alkutimiĝi al la ĉirkaŭaĵoj fraŭlinon.

Post kelkaj interkonsiliĝoj oni decidis doni al Rozo sufiĉe da mono por veturigo ĝis iu alia migrula centro

ankoraŭ alilande. Ŝi estis forveturigata, oni ne scias kial, en Aŭstrion. Tie ŝi loĝis dum tri monatoj en Wien; poste estis sammaniere pluveturigata en Napolon, kie ĵus komencis organiziĝi la rusa studenta kolonio.

En Napolo la sorto renkontigis ŝin kun alia fraŭlino, same hebreino, kiu sin loĝigis tie -- kiel ŝi diris -- "pro la sano" kaj kiu same vivis duonmalsate, ne ricevante el la hejmo eĉ unu kopekon da mono.

Kiel okazas tre ofte, la fraŭlinoj rapide, sen intergradoj, preskaŭ tuj post la unua konatiĝo amikiĝis unu kun la dua. Rozo pasigadis ĉe la amikino tutajn tagojn, ofte restadis ĉe ŝi por dormo kaj fine ili decidis ekloĝi kune.

La amikino de Rozo estis pli energia kaj pli kapabla sin orienti en nova nekonata ĉirkaŭaĵo. Dum la komenca duonjaro, kiam oni ankoraŭ sendadis al ŝi po kvindek rubloj monate, ŝi sukcesis sufiĉe ellerni la lingvon italan. Kaj kiam ŝi ricevis de la patrino leteron plenan de plendoj kun sciigo, ke "la hejmaferoj iras tre malbone, la mono mankas kaj ofte oni havas eĉ nenion por manĝi" -- ŝi ne perdis kuraĝon. Post kelktaga kurado al siaj konatoj, al konatoj de tiuj ĉi konatoj kaj al konatoj de la novaj konatoj, ŝi sukcesis trovi kelkajn malmulte pagatajn lecionojn. Pri tiuj lecionoj oni devis sin okupi dum preskaŭ tuta tago, la fortoj konsumiĝis tute ne samproporcie je la kvardek-kvindek frankoj gajnataj, sed la entrepreneman fraŭlinon tio tre malmulte maltrankviligis. Ŝi estis kontenta, ke ŝi povis resti en Italujo "pro la sano," povis iamete vizitadi la ombroplenan "Villa Nazionale," enspiri la sanigajn aromatojn de la maro kaj, eble, revii pri la momento, kiam ŝi resaniĝos kaj ekpovos reveni Rusujon.

Konatiĝinte kaj amikiĝinte kun Rozo, ŝi mallonge kaj simple, tute ne tuŝante la nedelikatan demandon financan, proponis al Rozo, ke ŝi ekloĝu ĉe ŝi. La junulino, kompreneble volonta, konsentis je tio. Kaj ili komencis duope dividi la duonmalsatajn vivojn.

Ĝuste en tiu tempo mi konatiĝis kun Rozo.



INTER lingvaj Esperantistoj: Grava novaĵo!

Kio do? La Akademio ĵus akceptis la sufikson oz?

Tute ne, sed ĵus aperis nova reformprojekto de Esperanto: Antido No. 77 bis, kun la 32a teorio pri derivado, la 26a alfabeto internacia...

Vere grava. En kio konsistas tiu reformo?

Ĝi ne estas reformo, sed nur alitonigo de Esperanto.

Nu, bone, kaj poste?

Jen, la substantivo finiĝas per o renversita, la verbo per e, la adverbo per i sen punkto...

Tre interesa.

La multenombro finiĝas per w kaj la akuzativon oni montras metante la literon i kun punkto antaŭ la finiĝo. "Bonan Matenon" fariĝas "Bonia Matenio."...

Certe genia.

En la alfabeto oni forigis ĉiujn literojn kun vostoj, ĉar tio malplaĉas al la teknikistoj.

Fine, dank' al tiuj ŝanĝoj ĉiuj scienculoj tuj lernos Esperanton kaj la Idistoj estos polvigataj.

Jes, sed sekretaĵo: Antido jam preparas sistemon No. 78a kun la 27a alfabeto internacia. Tiu ĉi alfabeto estas sen literoj...

Dio volu, ke Antido de nun ĉiam publikigu siajn verkojn per tiu alfabeto. (Amen!—LA SIM.)--Esperanto.

## U. S. ESPERANTO ASOCIO.

### PRI FONDO DE NOVA NACIA ORGANIZO.



E longe multaj Esperantistoj en Usono pensas ke nia afero progresas ne sufiĉe bone kaj rapide en nia propra lando. Pro tio, kelkaj penis enkonduki en la E. A. N. A. plibonigojn per kiuj oni povus atingi pli kontentigan rezultaton. Pro diversaj kialoj, ili ne sukcesis. Do fine ili decidis fondi novan asocion.

Al D-ro M. M. Henry, el Dayton, ŝtato Ohio, apartenas la honoro sukcesigi ĉi tiujn klopodojn. Per tre fervora, saĝa, sindonema kaj persistema laboro dum preskaŭ jaro, li nun povas vidi la plenan starigon de nova organizo.

D-ro Henry unue dissendis cirkuleron donantan sciigon pri la afero; due, demandaron, per kiu li serĉis eltrovi la volon kaj la deziron de tiuj, kiuj malkontentiĝis je la malnova asocio. Li invitis aliĝon al la nova. Kaj denove li dissendis cirkuleron, en kiu li faris kelkajn demandojn pri la estraro. Sekvis baloto per la poŝto. Tiel organiziĝis vere demokrata nacia asocio kun jena oficistaro:

Prezidanto: B. F. Schubert, LL. B., LL. M., el Washington, D. C. (1505 North Capitol st.)

1-a Vicprez., D-ro F. E. Daigneau, Austin, Minn.

1-a Vicprez., D-ro Abraham Rudy, Raleigh, N. C.

3-a Vicprez., D-ro Warren Sherwood, Lancaster, Pa.

Sekretario, J. Howard Pearson, 110 West Water st. Decorah, Iowa.

Kasisto, Francis G. Morin, 831 Ewing st., Chicago, ŝtato Illinois.

Sek. por ŝtato Pennsylvania, John C. Vasselin, el Blossburg.

Sek. Connecticut, Hubert A. Welch, New Haven.

Sek. Ohio, Grover Peacock, Cincinnati.

Sek. New York, Oscar R. Whitehead, Herkimer.

Sek. Minnesota, C. H. Gibbons, Austin.

Sek. Indiana, Marshall White, Evansville.

Sek. Iowa, Chester C. Camp, Grinnell.

Sek. Oklahoma, Oran Burk, Aline.

Sek. Colorado, Clifford M. Balkam, Colorado Spgs.

Sek. Illinois, Prof. C. M. Wirick, Chicago.

Sek. Missouri, S-ino Mary B. Ketchum, St. Louis.

Sek. Nebraska, R. G. Hulburt, Taylor.

Sek. Kansas, D. T. Armstrong, Wichita.

Sek. Washington (la ŝtato), Reginald Kerkhoven, Spokane.

Sek. Oregon, Louis A. Kearney, Arleta.

Ĝis tiu tempo, kiam la asocio havos sian propran organon, LA SIMBOLO publikigos sciigon pri ĉi tiu nova organizo.

F. R.




JEN nova bona Esperanto Gazeto, "Riga Stelo," kiun oni publikigas ĉe Kreststrato 11, Riga, Rusujo. La abonprezo estas Sm. 2,50. Redaktata en rusa lingvo kaj Esperanto. Bonvenon, kolego.



## EN RUSUJO PER ESPERANTO.

### EL IMRESOJ DE VOJAGHANTO TRA RUSUJO (1).



**K**ELKAJ el miaj legantinoj kredeble ne scias precize, el kio konsistas la samovaro; mi do priskribos ĝin iom detale, ĉar ĝi estas tre grava elemento kaj kvazaŭ la simbolo de la rusa hejmo, kiel la fajrujo ĉe la okcidentaj popoloj. Ĉar ne fajrejoj, t. e. kamenoj, hejtas la rusajn domojn, sed centra fornego iom komparebla kun tiuj de niaj bakistoj, konstruita tiel, ke ĉia ĉambro povu hejtiĝi per ĝia kontakto. Sekve, dum la vintra malvarmego, ne apud kameno, kiel ĉe ni, la rusaj familioj sidas por pasigi la longajn vesperojn, sed ĉirkaŭ la samovaro, staranta sur la tablo kaj aldonanta sian kutiman murmureton al la paroladoj de la familia rondo, kiel la grilo de niaj kamenoj.

Samovaro estas kupra vazego, kun piedo, havanta du tenilojn, supran mallarĝan faŭkon kaj malsupran kranon. Ĝin trairas, laŭ ĝia tuta alteco, centra tubo, dividata je du partoj per krado. Sur la supran faŭkon, kie estas la ekstremaĵo de tiu interna tubo, oni povas almeti laŭvole ĉu ferladan kamentubeton ĉu kupran piedestaleton kaj kovrilon. Verŝinte akvon en la samovaron, oni ŝutas en la centran tubon, sur la kradon, karberojn, kiujn oni ekbruligas per aertirado kun la helpo de l' ferlada kamentubejo. Kiam la karbo brulas kaj kiam ekronkas la akvo, verŝita ĉirkaŭe en la samovaro, oni anstataŭigas la kamentubeton per la piedestaletoj kaj oni

(1) El libro de tiu titolo—el "Ondo de Esperanto."

alportas la samovaron antaŭ la mastrino, sur pletego, kie jam orde estas teskatolo, tekruĉeto, sukerujo, teler-tuko, glasoj, teleroj, kuleretoj kaj konfitaĵoj.

Kompreneble, ne mia eta Katja povas alporti tiun multpezan ilaregon, sed ŝia kuiristina moŝto Ksenja mem solene plenumas tiun gravan oficon.

De tiam komenciĝas la rolo de la rusa domestrino, per kiu sin montras plej plene ŝiaj mastraj lerteco kaj afableco. Ŝi verŝas per la krano de la samovaro iom da bolanta akvo en la tekruĉeton por varmigi ĝin, forĵetas tiun akvon en la lavtason, ŝovas teon en la varmigitan tekruĉeton, alverŝas bolantan akvon, metas la tekruĉeton sur la piedestalon super la kamentubo, kaj plie kovras ĝin per la telertuko por ke la infuzo estu pli perfekta. Iom poste estas en la tekruĉeto teo malhela kaj tre forta. La mastrino verŝas iom da ĝi en la glasojn kaj almetas pli malpli da bolanta akvo por ĝin malfortigi, laŭ la deziro de siaj gastoj. Samtempe, ŝi proponas, sur la teleroj, konfitaĵojn, kiujn oni gustumas per malgrandaj pecetoj kune kun plenkuleretoj da teo. Tuj kiam unu glaso da teo estas malplena, la mastrino afable proponas alian, lavas la glason per iom da bolanta akvo, kiun ŝi forĵetas en la lavtason kaj ree verŝas novan plenglason. Tiel glason post glaso oni trinkas, iafaĵe dum horoj.



URBETANO: Kiel estas pri tiu nudpieda danco okazonta ĉe la teatro? Kelkaj ĉefaj urbanoj iom konsterniĝas pro ĝi.

Ni forigis ĉiujn ĝiajn kritikindajn karakterizojn.

Nu, precize tio! Ni ja timis ke vi tion farus.

---

---

## *The Peace Pipe*

Angla gazeto — de Charles Eugene Banks — P.-I. Building, Seattle, U. S. A. Sendu du respondkuponojn (aŭ dek cendojn) kaj ricevu returne specimenan ekzempleron kune kun dek "Little Hierograph" poŝtkartoj. Tiam vi povos envicigi vin en tutmondan movadon por konservi la vivon de la birdoj, bestoj, fiŝoj, arboj, floroj. Oni konsentos liberalan rabaton al agentoj.

---

---

# ESPERANTA PRESEJO

“GLANO”

Ĉiuspeca Moderna Presaĵo nun estas havebla ĉe  
la supre nomita Presejo.

## JUS APERIS

### “La Esperanta Kunulo”

Lernolibro de la Lingvo Esperanto  
En Angla Lingvo por Anglaj Parolantoj

Verkita de S-ro. J. W. Wood

Enhavas plen n gramatikon kun klaraj notoj komentaj;  
simplajn klarigojn de reguloj, kun ekzemploj de sia  
uzado; bone elektitan historieton por la komencanto  
legi kaj studi; vortaron Esperantan-Anglan, k.t.p.  
Bonege presita, en oportuna poŝa formato, kaj estas  
vendata je la malkara prezo de 25 cendoj [50 sd.]  
Mendu nun. Sin turnu al la eldonejo

## ACORN PRESS

943 Commerce St., Tacoma, U.S. A.